

# BELGA ESPERANTISTO

## MONATA REVUO,

redaktata de Léon Champy, Fr. Schoofs, Van der Biest-Andelhof,  
Jer. Van Laere kaj Oscar Van Schoor.

### ABONPREZO :

Belglando . . . Fr. 4.— (Sm. 1.60)  
Eksterlando . . . Fr. 4.50 (Sm. 1.80)  
Unu numero . . . Fr. 0.40 (Sm. 0.16)

Sekretariejo : 49, Kleine Beerstraat,  
(rue de la Petite Ourse), Antwerpen-  
Anvers.

Abonoj kaj Monsendoj : 20, Vondel-  
straat (rue Vondel), id.

Jurnaloj, broŝuroj, libroj : 26, Arend-  
straat (rue de l'Aigle), id.

*Nepresitajn manuskriptojn oni ne resendas. — La Redakcio konservas por  
si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn.*

## Kuragigajoj.

Plezure ni konstatas la daŭrigan simpatian akcepton faritan  
al nia revuo.

Ne nur la esperantista presaro tre favore salutis ĝian  
aperon, sed ni ricevis plie, krom la jam publikigitaj leteroj,  
gratulantajn atestejn de multaj aliaj eminentaj samideanoj. El  
niaj eksterlandaj korespondantoj ni citos : S-roja D<sup>ro</sup>na **P. Cor-  
ret** (Parizo), **Prof Otto Simon** (Vieno), **Bolingbroke-  
Mudie** (Londono), **P. J. Kelly** (id), **Rafaelo Bagnulo**  
(Napolo), **Kapitano Vincente Inglada** (Valencio), **Evasti-  
feŝeff** (Sofio) kaj **Prof. Christaller** (Stuttgart).

Tutkoran dankon al ĉiuj !

**B. F.**

## BELGA LIGO ESPERANTISTA

*Raporto pri la komitata kunveno, okazinta en Bruselo, je la 24<sup>a</sup>  
de Januaro 1909, en salono de la « Café des trois Suisses ».*

**S<sup>ro</sup> Van der Biest-Andelhof**, prezidanto, malfermas la kunsidon je  
la 10 1/2a matenc.

Ĉeestas : S<sup>roj</sup> **L. Champy**, Komandanto **Duverdijn**, Abato **Richardson**,  
**Fr. Swagers** kaj **O. Van Schoor**, delegitoj de la ĝenerala kunveno ;

**S<sup>ro</sup> Van der Biest-Andelhof** kaj **A. Finet** (Antverpena Grupo Esper-  
antista), — **Fr. Schoofs** kaj **J. B. Istace** (Verda Stelo), — **J. Albert** (Antaŭen  
**Beyne-Heuzay**), — **Cam. Babilon**, anstataŭanta **S<sup>ro</sup>n J. Clerbaut** (Boma Grupo)



— F<sup>ino</sup> B. Ledène kaj S<sup>ro</sup> A. J. Witteryck (Bruga Grupo Esperantista). — F<sup>ino</sup> A. Guillaume kaj S<sup>ro</sup> Oct. Chalon (Pioniro, Bruselo). — L. Delvaux (Karlорега Grupo Esperantista). — Pol Stappers (Stelo Matena, S<sup>ro</sup> Trudo) — kaj J. Parotte (Esperantista Grupo, Verviers).

Senkulpigis: S<sup>roj</sup> D<sup>ro</sup> R. Van Melckebeke, D<sup>ro</sup> Dupont kaj Verbeken.

S<sup>ro</sup> L. Champy, sekretario, legas la raporton pri la lasta kunveno kiu estas aprobata post ŝanĝo postulita de S<sup>ro</sup> Chalon. Anstataŭ ol « la Lingva Komitato ne havas sufiĉan aŭtoritaton... » oni legu: « la Lingva » Komitato kaj ĝia Akademio havas nenian rajton por solvi la lingvan » demandon, ĉar, elektita, sen speciala programo, de kelkaj centoj da kon- » gresanoj en Boulogne-sur-Mer, ĝi ne havas sufiĉan aŭtoritaton por » decidi ion ajn je l' nomo de l'tuta esperantistaro. »

Oni pridiskutas la tagordon.

1<sup>o</sup> *Enkonduko de Esperanto en la Publika Instruado.*

Post longa diskutado pri diversaj proponoj en kiu partoprenas S<sup>roj</sup> Van der Biest, Albert, Parotte, Chalon, Witteryck, Swagers, Van Schoor kaj Champy, la kunsido akceptas la proponon de S<sup>ro</sup> Champy: kolekti la necesajn dokumentojn kaj sendi al la ministro de Sciencoj kaj Artoj detalan raporton pri la nuna stato de Esperanto, kaj peti lin ke li bonvolu ekzameni la eblecon enkonduki Esperanton en la lernejoj; — samtempe oni submetos la demandon al la proksima kongreso de instruistoj kaj al ĉiuj societoj kiuj sin okupas pri instruado, por ke ili apogu nian peton al la Ministro. Laŭ la opinio de S<sup>ro</sup> Champy oni devos, ĉiujare, sendi novan raporton ĝis kiam oni sukcesos.

2<sup>o</sup> *Nia agado okaze de la Ekspozicio de 1910 en Bruselo.*

S<sup>ro</sup> Swagers enkondukas tiun punkton. Li proponas la starigon de konstanta oficejo en la Ekspozicio mem, por havigi al la vizitontaj ĉiajn utilajn sciigojn kaj por agrabligi, kiel eble plej multe, ilian ĉeestadon en nia lando.

Post diskutado en kiu partoprenas S<sup>roj</sup> Van der Biest, Chalon, Witteryck kaj Champy oni akceptas principe la proponon de S<sup>ro</sup> Swagers. Oni decidas peti la konsilojn kaj la apogon de la Centra Oficejo. Pliĉ S<sup>ro</sup> Champy deziras ke oni sin turnu ankaŭ al la fabrikantoj de esperantistaj komercaĵoj.

3<sup>o</sup> *Literatura konkurso.*

S<sup>ro</sup> Swagers proponas ke la Ligo organizu konkurson pri esperantistaj noveletoj, celantan stimulan kaj elvokantan literaturan movadon inter la belgaj esperantistoj.

Unuvoĉe oni akceptas la proponon. La financa flanko tuj estas solvata de S<sup>ro</sup> Witteryck, kiu konsentas pagi la premiojn. Li deziras verkigi originalajn monologojn, ampleksaj maksimume je du paĝoj laŭ la formato de « Belga Esperantisto ». La premioj estos 25, 15 kaj 10 frankoj. La premiitaj verkoj restos la posedaĵo de S<sup>ro</sup> Witteryck. La juĝantaro de la konkurso estos tiu de la ekzameno por la akiro de atesto pri profesora kapableco.

Oni petos la redakcion de « Belga Esperantisto » enpreni la kondiĉojn pri la konkurso (1).

S<sup>ro</sup> Van der Biest, prezidanto, esprimas la dankon de la kunsidantaro al S<sup>ro</sup> Witteryck pro la nova provo de lia sindona al Esperanto.

4<sup>o</sup> *Starigo de la Lingva Komisio.*

Ĉar la numero de « Belga Esperantisto » kiu entenas la klarigojn donitajn de S<sup>ro</sup> Swagers, pri tiu punkto, ne jam aperis, oni ne povas utile pridiskuti la demandon kaj oni interkonsentas prokrasti la decidon pri tio ĝis la proksima kunveno.

(1) Vidu paĝon 76.

5<sup>o</sup> *Generala kunveno de la Ligo.*

S<sup>ro</sup> Parotte proponas ke ĉiujare la ĝenerala kunveno okazu en alia urbo. La ĉeestantaro aprobas tiun ideon kaj decidas ke oni kunvenos en Verviers dum la venonta somero.

6<sup>o</sup> *Revizio de la regularo pri la ekzameno. Baloto de la juĝantaro.*

Post kelkaj proponoj de S<sup>ro</sup> Van der Biest, kiuj ne postulas longan diskutadon, oni akceptas la regularon aldonitan al tiu ĉi raporto. Kies enpresos estos petata en « Belga Esperantisto. » (1)

Kiel efektivaj membroj de la juĝantaro estas elektataj:

S<sup>roj</sup> A. J. Witteryck, Luc. Blanjean kaj Fr. Swagers.

Kiel anstataŭantaj membroj:

F<sup>ino</sup> B. Ledène, F<sup>ino</sup> A. Guillaume kaj S<sup>ro</sup> Ad. Finet.

7<sup>o</sup> 6<sup>a</sup> *Tutmonda Esperantista Kongreso.*

La Prezidanto anoncas ke la VI<sup>a</sup> tutmonda esperantista kongreso okazos en Chautauqua (Usono) dum 1910.

Konsekvence tiu kongreso ne estos en Antverpeno, kiel estis anoncita en Dresdeno.

La kunsido disigas je la 13<sup>a</sup> horo.

La Ĝenerala Sekretario,  
LÉON CHAMPY.

## ATESTO PRI PROFESORA KAPABLECO

En sia kunveno de la 24<sup>a</sup> de Januaro 1909 la komitato de la B.L. E. reviziis la regularon pri la ekzameno por akiro de « atesto pri profesora kapableco. »

La ekzameno okazos ĉiufoje kiam minimume 5 kandidatoj (aŭ kandidatinoj) sin prezentos; la juĝantaro kunsidos en urbo difinita de la Prezidanto de la Ligo.

La ekzameno estos duobla; la unua parto estos skriba kaj la dua voĉa.

La kandidat(in)o, kiu malsukcesas en la unua parto, ne estos kunvokata por la dua.

### PROGRAMO

**Skriba ekzameno** (sen helpo de vortaro).

Traduko el Esperanto en nacia lingvo.

Traduko el nacia lingvo en Esperanto.

Letero laŭ difinita objekto.

### Voĉa ekzameno

Traduko el Esperanto en nacia lingvo kun demandaro pri la enhavo de la teksto kaj la gramatikaj malfacilaĵoj.

Flua interparolado.

Instruado pri gramatika punkto aŭ vortformado.

N. B. Antaŭ la prezento de la leciono, la kandidat(in)o povas prepari sin dum unu horo.

(1) Vidu ĉi sube.



### KONDICOJ

La kandidat(in)o estos almenaŭ dek-okjara.

Ĉiu membro de la ligaj grupoj aŭ de la Ligo povas partopreni en la ekzameno.

La enskribo kostas 10 frankojn. Je okazo de malsukceso la nova enskribo estos senpaga.

La kandidat(in)o sciigos kiun nacian lingvon li aŭ ŝi elektos.

### JUGANTARO

La juĝantaro enhavos tri efektivajn kaj tri aldonitajn membrojn, elektitajn de la komitato de la B. L. E. por tri jaroj.

La juĝantaro por la jarserio 1909-1912 estas kunmetita jene :

**Efektivaj membroj** : S<sup>roj</sup> A. J. Witteryck, L. Blanche kaj Fr. Swagers.

**Aldonitaj membroj** : F<sup>inoj</sup> Anna Guillaume, Bertha Ledène kaj S<sup>ro</sup> Ad. Finet.

La enskriboj estos adresataj plej malfrue 5 tagojn antaŭ la ekzameno al la Prezidanto de la B. L. E., Arendstraat 26, Antwerpen (Rue de l' Aigle 26, Anvers).

La kosto de la enskribo estos pagata en la loko mem de la ekzameno ; tiun lokon montros la kunvoko.

Bruselo, la 24<sup>a</sup> Januaro 1909.

Je l' nomo de la B. L. E. :

La Ĝenerala Sekretario, La Prezidanto,  
LÉON CHAMPY. VAN DER BIEST-ANDELHOF.

### Literatura Konkurso

*Por la abonantoj de Belga Esperantisto kaj por ĉiuj membroj de la Belga Ligo.*

**Kondicoj** : 1<sup>o</sup> Oni verku novan originalan *monologon*, taŭgan por esti deklamata dum esperantistaj grupaj festoj.

2<sup>o</sup> La monologo povas esti longa maksimume du paĝojn 16 x 25 (formato de « Belga Esperantisto »).

3<sup>o</sup> La konkursontoj ne povas skribi sian nomon sur la verkaĵon, sed *devizon aŭ ian ajn signon*, kiu devas ankaŭ esti skribita sur kunmetita sigelita leterkovrilo en kiu ili enfermos bileton portantan ankaŭ la devizon kaj sian adreson.

4<sup>o</sup> La verkoj devas esti sendataj, antaŭ la 25<sup>an</sup> de Majo, al S<sup>ro</sup> Van der Biest-Andelhof, Prezidanto de la Belga Ligo Esperantista, 26, Arendstraat (Rue de l'Aigle,) Antwerpen (Anvers).

Tri premioj estos aljuĝataj ; nome :

1<sup>a</sup> premio : 25 frankoj

2<sup>a</sup> » 15 »

3<sup>a</sup> » 10 »

La gajnantoj ricevos, krom tiujn premiojn, honoran diplomon de la Belga Ligo.

La premiotaj verkaĵoj iĝos la proprajo de S<sup>ro</sup> A. J. Witteryck, Vic-Prezidanto de la Belga Ligo, kiu afable bonvolis donaci la premiojn.

La juĝantaro de la konkurso konsistos el : S<sup>roj</sup> SWAGERS, BLANCHE kaj FINET.

La nomoj de l' gajnantoj estos publikigataj en la *Junia* numero de « Belga Esperantisto » kaj la premioj estos disdonataj dum la proksima BELGA KONGRESO, kiu okazos dum la somero de tiu ĉi jaro.

### LA EFEKTIVIGO DE LA ĜENERALA INTERKONSENTO

Kun ĝojo la fidelaj Esperantistoj vidas ke fine ĉiulande la principo *interkonsente antaŭen* venkas kaj regas. Iom post iom la paco reunuigas la diversopiniajn batalantojn, kaj jam kelkaj tro frue eksigintaj samideanoj revenis en niajn vicojn, kie ni bezonas la bonvolan konsilon de la plej fervora progresemulo tiel kiel tiun de la plej fidela fundamentano.

Alia ĝojiga fakto estas ke diversflanke oni proponas rimedojn por interkonsente reguli la evolucio de Esperanto.

Mi kore aplaudas ĉiujn tiajn rimedojn, kaj persone mi estas preta forlasi mian proponon (Vidu la 2<sup>an</sup> n<sup>on</sup> de la Belga Esperantisto, p. 42) por akcepti kaj eĉ propagandi tiun, kiu klare prezentus sin kiel la plej bona.

Mia artikolo *Interkonsento* jam aperis, kiam mi konatiĝis kun la propono de S<sup>ro</sup> D<sup>ro</sup> H. Sentis. Mi plezure rimarkis ke ni ambaŭ elpensis nian interkonsentigan sistemon laŭ kaj pro la sama tialo, kaj celas la saman ĝeneralan pacigon inter la progresemuloj.

Nur niaj agmanieroj estas malsamaj. S<sup>ro</sup> Sentis konsilas : krei specialan gazeton ; pridiskuti la reformojn en ĝi ; post voĉdono enkonduki ilin unu post la alian, almenaŭ en la artikolojn de tiu ĵurnalo ; post unujara uzado, kaj post alia voĉdono submeti ilin al la sankcio de la Lingva Komitato ; — la voĉrajtaj personoj estante elektotaj kompetentuloj.

Unuapripense, la propono de S<sup>ro</sup> Sentis plaĉas. Ĉar, kompreneble, se ĉiu kompetenta Esperantisto en la mondo apogus lin kaj kunfarus la de li proponitan gravan laboron, la antaŭenmarŝo de Esperanto estus regula, sana, potenca.



Sed... la rezultato praktika estos nepre ne tiel rozkolora.  
Car :

1° la bonintencaj cirkuleroj de S<sup>o</sup> Sentis malfacile atingos la ĉiulandajn kompetentulojn ; nur post multaj monatoj ili sukcesos unuigi aron, sed neniel sufiĉe grandan ;

2° la starigota gazeto iĝos vera diskuta kaj disputa ĵurnalo, publika esperanta disputejo ;

3° sekve, oni baldaŭ vidos ke malkontentigitaj proponintoj forlasas la ĵurnalon kaj starigas alian (malamikan !) por defendi siajn reformojn ;

4° tial ke fine, en Francujo kaj en aliaj landoj, ekzistos multo da tiaj disputaj organoj, la granda publiko amuzos sin pro tia ridinda Esperantista presajaro kaj la propagando por nia lingvo ne estos plu ebla.

Plie, la sperto sufiĉe klare pruvis ke lertaj kleruloj povas fari belan sciencan laboron, sed, malgraŭ tio, esti neniel praktikemaj. Kvankam, laŭ la regularo de S<sup>o</sup> Sentis, mi, kiel aŭtoro aŭ duagrada profesoro, havus voĉrajton en tiu aro da plibonigontoj, mi humile konfesas ke ordinara samideano okaze povas havi pli simplan, kaj tial ofte pli praktikan ideon ol mi.

Aliparte, la proponita unujara uzado de iu reformo en tia ĵurnalo pruvos nenion, se, kiel estos eble, nur samlandanoj aŭ samlingvanoj uzos ĝin.

La de S<sup>o</sup> Sentis principe tiel bone elpensita efektivigo de l'interkonsento bedaŭre ne taŭgas, ĝi tute ne estos sufiĉe ĝenerala, kaj, pro sia publikeco pri la diskutoj, ĝi grave malhelpos la aktivan propagandon, kiun ni tiom nepre bezonas.

Ĝis nun mi ĉiam insistas pri mia propono, plibonigota aŭ ne. Ke la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio ekzamenu, komparu kaj decidu !

En la Esperantistaro ĝenerala estraro ekzistas, kiu povas vivi kaj vivigi. Ni deziras ke, per baldaŭa ekago, ĝi kontentigu la progresemlulojn kaj renasku la ĝeneralan pacon inter la Esperantistoj.

FRANS SWAGERS.

### Al la Legantaro de « Belga Esperantisto »

*Karaj Samideanoj belgaj kaj ĉiulandaj,*

La fondintoj de nia nova revuo invitis min sendi al « B. E. » artikolojn pri la blinduloj, se eble ĉiumonate.

Plezure kaj danke mi akceptas la inviton : danke, ĉar kiel en ĉiuj landoj, tiel ankaŭ en Belgujo, la blinduloj estis de la komenco la tre amataj infanoj de la Esperantistaro ; plezure, ĉar per tiaj artikoloj mi esperas sukcesi konatigi al

pli multaj homoj la interesplenajn blindulojn, kaj tiamaniere kunhelpi al la plibonigo de ilia sorto ; plezure ankaŭ, ĉar en tia laboro mi sendube trovos ilon por disvastigi nian karan lingvon inter la tutmondaj neviduloj.

Mi penados kontentigi nian legantaron, ne montrante al ĝi plendindajn malfeliĉulojn, sed kuraĝplenajn infanojn kaj homojn, kies nura celo estas trovi la feliĉon per laboro, arto kaj scienco, per plenumo de ĉiaj devoj, per la volo sin igi utilaj membroj de la homaro.

Plej ofte se ne ĉiam, tiuj artikoloj estos elĉerpitaj el iliaj interkorespondoj ĉiulandaj, ĉar jam de nun, ne pasas monato, dum kiu la Woluwa Esperantista Blindulgrupo ne ricevas leteron de fremdlandaj samsortanoj.

Car ni povas esperi, ke B. E. estos legata en ĉiuj landoj, la blindaj Esperantistoj ĉiulandaj baldaŭ konatigos kun ni kaj fervore helpos nin por diskonatigi tra la tuta mondo la tutmondan blindulagadon.

En la landoj, kie Esperanto estas ankoraŭ nekonata de la blinduloj, la Esperantistoj mem, sen ia dubo, helpos nin varbi samideanojn el siaj blindaj samlandanoj.

Pro tio, mi petas vin, vin precipe, ĉiulandaj kunfratoj pro blindeco, respondi la sekvan demandaron, kaj sendi tiujn informojn al la

*Woluwa Blindulgrupo Esperantista*

*Woluwe-Bruxelles :*

- 1° Kiom da blinduloj estas en via lando ?
- 2° Kiom da blinduloj estas en lernaĝo (6-ĝis 20 jaraj) ?
- 3° Kiom da blinduloj en lernaĝo estas en la specialaj institutoj ?
- 4° Kiom da institutoj ekzistas en via lando ?
- 5° En kiuj institutoj la blinduloj lernas Esperanton ?
- 6° Cu ekzistas revuoj por aŭ pri la blinduloj ?

En numero proksima la Woluwa Blindulgrupo respondos tiun demandaron pri Belgujo. En sekvanta numero mi intencas publikigi tiun statistikon pri ĉiuj landoj el kiuj ni ricevos respondon.

Car kredeble tiu numero estos sendita al ĉiuj ĉefaj blindulejoj, jen estas kelkaj informoj utilaj :

a) S<sup>o</sup> CART, Rue Soufflot 12, en Parizo, eldonas monatan revuon, Braille presitan por la blinduloj, « Esperanta Ligilo » ; abonprezo por ĉiuj landoj : 3 frankoj.

b) Esperantaj lernlibroj estas aĉeteblaj ĉe S<sup>o</sup> CART ; kaj ankaŭ ĉe la Woluwa Reĝa Blindulejo, Woluwe-Bruselo. Katalogo aperos en sekvanta numero.

c) Skribtabuleto per Braille (malgrandaj literoj) kaj per belga punktskribo (por skribi al viduloj, sistemo de fr. Izidoro) estas aĉetebla ĉe la sama Woluwa Blindulejo, prezo 19 fr. (sendo afrankita).



d) De la 30<sup>a</sup> de Marto ĝis la 3<sup>a</sup> de Aprilo 1909<sup>a</sup> okazos en Napoli (Italujo) tutmonda kongreso por la plibonigo de l'blindulsorto. La Itala lingvo estos la oficiala, sed ĉiuj lingvoj estos permesataj, do ankaŭ Esperanto. Ni profitu el tiu grava okazantaĵo por disvastigi nian ideon inter la tutmonda blindularo. Spaco mankas por konatigi tie ĉi la oficialan demandaron. Por ĝi oni skribu al S<sup>ro</sup> Martuscelli, Direktoro de l'Napola Blindulinstituto, sed oni povas preparoli aliajn temojn. Mi insiste invitas la blindajn Esperantistojn kaj la blindul-instruistojn ke ili sendu al tiu kongreso, en Esperanto kaj en sia nacia lingvo, petskribon por ke ĉiuj blindulejoj akceptu Esperanton sur siaj programoj. Ju pli multnombraj estos tiuj petskriboj, des pli efektaj ili estos ĉe la kongresanoj.

Kiuj esperantistaj grupoj volas subskribi la jenan deziresprimon, kiu estas sendota al la Kongreso?

« La subskribinta esperantista grupo, konsiderante kiom » efika estus internacia lingvo por plibonigi la sorton de » l'blindularo, petas la Napolan kongreson esprimi la deziron » ke Esperanto estu skribata sur la programon de ĉiuj » blindulleteroj. »

FR. IZIDORO,  
profesoro ĉe la Reĝa Blindulejo de  
Woluwe-Bruselo.

## Impresoj de Angloj pri Antverpeno.

Revenante ĉe l'Dresdena kongreso, okdeko da anglaj Esperantistoj haltis dum unu tago en Antverpeno. Jen mi tradukas el « British Esperantist » la rakonton de F<sup>ino</sup> Margaret Jones pri tio, kion niaj anglaj samideanoj vidis kaj sentis en la Skeldurbo.

... Je la 7<sup>a</sup> matene, la plimulto el ni estis sur la ferdeko, enspirante la freŝan aeron, kaj post la matenmanĝo ni trairis la urbon ĝis la Centra Stacidomo. Tiuj, kiuj neniam vizitis fremdajn landojn, ne havas klaran ideon pri la belegeco de l'stacidomoj, kiujn ni vidis. En Hamburgo, Dresdeno, Nurnbergo, k. c., ili estas tre rimarkindaj, sed la Antverpenanoj precipe povas plenrajte fieri pri sia Ĉefstacidomo. Ĝi ja ŝajnas marmora palaco pli ol loko por alveno aŭ elveturo de vagonaroj. Ĉe l'enirejo estis Antverpenaj samideanoj, kiuj kondukis nin en la luksan atendejon unuaklasan, kie S<sup>ro</sup> Van der Biest deziris al ni bonvenon.

Kiam ni, post interkonatiĝo, forlasis la halon, pluvegis; sed post unu horo la suno reaperis kaj ebligis al ni veturi al la belega Urbestra Domo. Poste ni piediris al la Muzeo

Plantin, la devenejo de l'Antverpena presarto. La interesaj kolektoj estis klarigataj al ni de l'Antverpena Esperantisto S<sup>ro</sup> Finet. La admirinda antikva domo Plantin'a ŝajnas ankoraŭ tiel nova kaj fortika kiel estis tiu gastama hotelo dum la 16<sup>a</sup> jarcento. Alrigardante denove ĝiajn pargetojn, murojn kaj meblaron, mi pripensis la ĝojon kiun ĉi ĉio estus doninta al Ruskinite. Kiom Plantin devis ami tiun arton kaj siajn librojn, kaj kiom li zorgadis la boneston de siaj kunlaborantoj, kies nomojn oni ankoraŭ legas ĉe la muroj de l'multaj laborĉambroj! La beleta interna ĝardeneto kaj la korto klare esprimas la vivserenecon de l'malnovaj tempoj; tial multaj el ni bedaŭre forlasis la muzeon por viziti ceterajn vidindaĵojn.

Por la tagmanĝo nia aminda gvidisto estis invitinta lokajn amikojn kaj ĉe prizorginta specialan manĝon por la vegetaranoj. Unuvorte, ni konfesu ke la delikateco kaj gastemeco de niaj samideanoj en ĉiuj urboj estis admirindaj kaj meritas pli ol simplan citaĵon.

Post la tagmanĝo ni vizitis la urbmuzeon, kies famajn pentraĵojn kaj belegajn skulptaĵojn ni admiregis. Ni diru ankaŭ ke same estas tre admirindaj la murpentraĵoj de l'Urbestra domo. Senkontraŭdire, Antverpeno devas esti citata inter la plej artoplenaj urboj.

Poste, antaŭvespere, ni alveturis al la Zoologia Ĝardeno kiun ni vizitis po duonprezo, dank' al la zorgemo de niaj Antverpenaj amikoj. La kolekto estas vere admirinda bestaro; sed pri kio ni plej miris estis la arta gusto kaj la pureco nin atentigantaj en ĉiuj loĝejoj de l'mambestoj, birdoj kaj rampobestoj.

Poste ni revojiris al nia ŝipo por vespermanĝi. Fine ni pasigis la vesperon en la urbo, vizitante magazenojn aŭ aŭskultante belan muzikon en publikaj placoj. Cetere la Cefpreĝejo nin treege atentigis.

Enlitiĝante ni ankoraŭ ĝuis la memoradon de interesa tago, bone plenigita kaj agrable pasigita.

JER. V. L.

## Esperanto facila

### En Tramveturilo

La vetero estis malbona: la vento forte blovis, kaj la pluvo, per multaj hektolitroj da akvo, penis (!) purigi la strat-ojn de la malpura suburbo(?), kien miaj aferoj vokis min tiun matenon.



Kiam mi povis reiri al la urbcentro, mi rapidis al tramhaltejo. Tie atendis jam maljuna kamparano, vestita per blua tola kitelo<sup>(3)</sup> kaj portanta nigran korbon. Tuj kiam li ekvidis min, li ekkriis per tondra voĉo kiel al de longe konata amiko: «Ha! ĉu vi volas ankaŭ vojaĝi kiel barono?»

Sen respondi, sed ridetante, mi rigardis la maljunulon. Li havis nek barbon, nek liphararon<sup>(4)</sup>; speciala nazo regis inter malgrandaj, grizaj okuloj. Ho! kia stranga nazo! Longa, tre maldika, kun vastaj flankajoj, vere kiel tranĉilo. Fidele, laŭ malnova kutimo<sup>(5)</sup>, mi baptis tiun viron Esperante: *Tranĉilulo*.

Dume, la kamparano daŭrigis brui. «Jen!» kriis li al aliaj tramvojaĝantoj, «jen alvenas nia aŭtomobilo!» Kaj forpuŝante ĉiujn, levante la nigran korbon, li unue ensaltis en la haltantan elektran tramveturilon.

Post li, supreniris bela sinjorino, poste mi kaj aliaj vojaĝantoj. La du internaj benkoj de la veturilo estis jam preskaŭ tute okupataj. Sed Tranĉilulo ekkriis laŭte al mi: «Rapidu, rapidu, sinjoro, tie ĉi estas ankoraŭ loko por vi!»

Mi sidiĝis do inter la bela virino kaj la kamparano. Kiam venis al ni la kondukisto, la belulino dolĉavoĉe petis: «Ĝis la fino de la vojo?»

«Kostas dek-kvin centimojn», diris la kondukisto, donante biletan.

La virino pagis per du moneroj da dek centimoj, lasante kvin centimojn kiel trinkmonon al la kondukisto. Tranĉilulo tre atente rigardis la pagon, laŭte ridante, kiam la kondukisto ĝentile levis la kepon.

«Saman biletan por mi», mi petis.

Sammaniere<sup>(6)</sup> mi pagis kaj donis trinkmonon; sama ĝentileco<sup>(7)</sup> de la kondukisto, sama atento kaj rido de Tranĉilulo.

«Ĝis la ekstremaĵo<sup>(8)</sup> de la vojo», tiu ĉi diris; sed, post ricevo de la bileto, li nur donis 10 centimojn.

«Tia bileto kostas 15 c.», mire diris la kondukisto.

«Ho! ho!» ridis Tranĉilulo, «ĉiu el tiuj ĉi biletoj kostas nur 15 c. ! Kiom kostas la tri biletoj kune? — 45 c. De la sinjorino, de mia amiko kaj de mi vi ricevis kune 50 c. Pro kio do vi plendas?»

La miro de la kondukisto ŝanĝiĝis en koleron.

«Cu vi intencas pagi 5 c. plie, aŭ redoni la biletan?» li kriis.

«Nu, nu trankvile!» diris Tranĉilulo, mi me estas riĉa, mi ne posedas la faman azenon Briklebrit<sup>(9)</sup>, mi nur prov- is vidi vian bonan koron. Jen ankoraŭ 5 c.

Kaj, dum la kondukisto daŭrigis sian laboron, Tranĉilulo amike murmuris en mia orelo:

«Estas la regulo, ĉu ne? La urbanoj ĉiam volas trompi la kamparanojn, do ni havas la rajton trompi vin ankaŭ. Jen! tiun ĉi matenon, mi jam enspezis kelkajn frankojn, aĉetinte<sup>(10)</sup> en la urbo cent konservitajn ovojn, kaj vendinte ilin tie ĉi tre facile je la prezo de tutfreŝaj. Ha! ha! ha!»

Jus en tiu momento, maljuna virino eniris la veturilon kaj serĉis lokon. Mi lasis al ŝi la mian, dirante ke la kamparano klarigos<sup>(11)</sup> al ŝi sian sistemon por rapide riĉiĝi, kaj mi iris sur la platformon, por fumi cigaron.

KLARIGOJ: 1) peni, zich moeite geven, s' efforcer. — 2) suburbo, voorstad, faubourg. — 3) tola kitelo, lijnwaeden kiel, sarrau en toile. — 4) liphararo, snor, moustaches. — 5) kutimo, gewoonte, coutume. — 6) sammaniere, op dezelfde wijze, de la même manière. — 7) ĝentileco, beleefdheid, politesse. — 8) ekstremaĵo, uiteinde, extrêmité, bout. — 9) Briklebrit, azeno kiu sputas oron, vidu «Fabeloj de fratoj Grimm.» 10) aĉetinte, daar ik gekocht had, gekocht hebbende, ayant acheté. — 11) klarigi, uitleggen, expliquer.

SKALDO.

## BELGA KRONIKO. (1)

**ANTVERPENO. Centra Komitato.** Per la iniciativo de la Antverpenaj grupoj fondiĝis antaŭ kelkaj semajnoj **Esperantista Ĥorkantistaro**, en kiu partoprenas kvardekon da anoj, sinjorinoj kaj sinjoroj. Ĝia direktanto estas S<sup>ro</sup> Ant. Gohr, kiu kvankam ankoraŭ juna, estas jam tre favore konata en la Antverpena muzika mondo.

Ni firme esperas kaj cetere ne dubas pri tio-ke la novstarigita rondo, sub la leita direktado de S<sup>ro</sup> Gohr, rapide prosperos kaj plene sukcesos.

— **Antverpena Grupo Esperantista.** Sabaton, la 6<sup>an</sup> de la nuna monato, la membroj de la A. G. E. ĝoje pri festis la 6<sup>an</sup> datrevenon de la starigo de sia societo, la plej malnova simila el la lando. Je tiu okazo festeno kunigis ilin grandare en la bela kongolanda salono de la «Taverne Royale». Je l' deserto S<sup>ro</sup> Van der Biest-Andelhof esprimis entuziasman toston al S<sup>ro</sup> Zamenhof, — S<sup>ro</sup> D<sup>ro</sup> R. Van Melckebeke plezure konstatis la floradon kaj la potencon de la grupo en kies starigo li partoprenis kaj trinkis je ĝia daŭriga prosperado; la subskribinto memorigis la unuajn paŝojn de la societo, ĝian konstantan antaŭenirado kaj la rimarkindajn akiritajn rezultatojn. Li esprimis varman dankon al ĉiuj kunlaborantoj kaj protektantoj kiu ĝin laboras, precipe al S<sup>ro</sup> D<sup>ro</sup> Van Melckebeke, kiu ĝis dum la lasta tempo ĝin prezidis.

La festo estis intermiksata de ĝojaj interparoladoj kaj kantoj. Ĝi finis tre malfrue! — per tre amuza improvizita ballo.

Ĉiuj partoprenintoj longtempe agrable memorigos pri la bela festa kunveno de la 6<sup>a</sup> de Februaro 1909.

**BRUGO.** Tre sukcesinta festo kunigis la 10<sup>an</sup> de Januaro la membrojn de la tiea grupo. La kokete presita programo citas muzikajojn luditajn de F<sup>ino</sup> S. Huisman kun S<sup>ro</sup> Dierckx, melodiajn kantitajn de S<sup>ro</sup> A. Goossens

(1) La grupoj estas petataj sendi siajn informojn plej malfrue antaŭ la 8<sup>a</sup> de ĉiu monato al la subskribinta raportanto, 20 *Strato Vondel, ANTI-VERPENO.*



kaj rimarkindan paroladon de S<sup>ro</sup> Leŭtnanto Speybrouck pri la Aerveturado. Nova kurso baldaŭ estos malfermata en Bruĝo.

**BRUSELO, Pioniro.** La ĉiusemajnaj kunvenoj de tiu vigla grupo estas daŭrige tre interesplenaj. Dum la lasta tempo oni tie faris paroladon kaj legadojn pri la jenaj temoj: *Tra montoj kaj valoj* (S<sup>ro</sup> Clalor), *Pri papilioj* (F<sup>ino</sup> De Luyck), *Laborado estas vivo* (S<sup>ro</sup> Blanche), *La hereditoj de onklo Daman* (S<sup>ino</sup> Staes), *La haveno de Bruselo* (S<sup>ro</sup> Maisonpierre), *La Terura Mano* (F<sup>in</sup>s Moreau), *Pri fama Brusela pedagogo* (Ab. Richardson).

Kelkfoje la tagordo nur citas: Interparolado sen programo. Tiam la grupanoj ekzerciĝas en la praktika uzado de nia kara lingvo, priparolante la lastajn okazintaĵojn aŭ la diversajn faktojn de la ĉintaga vivo.

— La ĵurnalo «Le Patriote», kiu diversefoje distingigis per sia frenezaj atakoj kontraŭ Esperanto, enpresas en sian numeron de 1-2 Januaro tre energian artikolon de nia fervora kunlaboranto S<sup>ro</sup> Abato Richardson, kiu tre taŭge defendas la celon kaj la agadon de Esperanto.

**NEŬTRA MORESNET'O. AMIKEJO.** La festa kunveno, kiu tie okazis la 27-an de Decembro kaj pri kiu ni parolis en la du antaŭaj numeroj de B. E., estis vere internacia rendezuo de Belgoj, Germanoj kaj Neŭtranoj. Delegitoj el Antverpeno, Verviers, Beyne-Heuzay, Belga Moresnet'o, Dusseldorf'o, Kolonjo kaj Aĥeno konatigis kaj kunfratigis kune kun la samideanoj el la ĉarma urbeto Moresnet'o.

Post komuna tagmanĝo en la hotelo Bergerhoff okazis tre bela koncerto en la elegante ornamita festĉambrego de la hotelo. Komedioj alternis kun monologoj kaj kantoj. La interpretintoj estis grupanoj el Amikejo kiuj ludis «*la Renkonto*» el Belga Moresnet'o (*la Gasto*), — el Verviers (*En la poŝtoŝtupo*). S<sup>ro</sup> Balthazar, el Beyne Heuzay, estis tre aplaudata pro sia monologo *la Pipamanto*. Grandan sukceson rikoltis F<sup>ino</sup> Tviseno kaj J. G. — la ĉarma fraŭlineto Maria Crahay el Amikejo, al kiu, meze de entuziasmaj aplaŭdoj, S<sup>ro</sup> Van der Biest, prezidanto de la Belga Ligo Esperantista prezentis bukedon kaj fine S<sup>ro</sup> Karlo Schriewer, la lerta, fervora kaj amara prezidanto de la Amikeja grupo al kiu ĉefe revenas la sukceso de la bela festo.

Ni ne forgesu la elokventajn salutojn de S<sup>roj</sup> Schriewer, Ph. Keller (Aĥeno) kaj Schmetz (Belga Moresnet'o).

La koncerto finis per la «*Espero*» kaj la «*Himno de Amikejo*», ĥore kantitaj de la multnombra ĉeestantaro. La Amikeja himno estas verkita de juna kaj talentplena samideano el Aĥeno, kin modeste sin kallas sub la pseŭdonimo PEKA.

La proksima landlima festo okazis dum la Printempo, verŝajne en Aĥeno. Antaŭ tiu tempo estos organizita federacio, en kiu partoprenos grupoj el la Reĵaregiono, Holanda Limburgo kaj la provinco Lieĝo.

**HOBOKEN.** La societo «Ligo de la diplomuloj de la industria lernejo Cockerill» organizis tre sukcesintan feston je Dimanĉo la 10<sup>an</sup> de Januaro en la festĉambrego de la kafejo «Hof van Hoboken».

Je tiu okazo, S<sup>ro</sup> Prof. Ad. Finet el Antverpeno faris tre interesan paroladon pri Esperanto. Li priparolis la necescon de lingvo internacia kaj la superecon de Esperanto, la simplecon, logikecon kaj belsonecon de la Zamenhofa lingvo, — la grandan disvastiĝadon kiun ĝi jam akiris tra la tuta kulturmondo, — ĝiajn grandajn utilojn por komerco kaj industrio, — la sukceson de la kvar kongresoj, — la ricecon de la teknika vortaro de Esperanto — kaj fine la jam tie ampleksan literaturon esperantistan. Kiel pruvon de la taŭgeco de nia lingvo por la traduko de literaturajoj, li legis la belegan poezion de Jan Van Beers «*La Merlonesto*», esperantigitan de nia amiko D<sup>ro</sup> W. Van der Biest.

Multe da lokaj eminentuloj kaj da Antverpenaj samideanoj ĉeestis la feston kaj tre interesigis pri la elokventa parolado de S<sup>ro</sup> Finet.

Oni anoncas la baldaŭan starigadon de grupo en Hoboken kaj organizadon de kurso.

**SALZINNES.** Antaŭ kelka tempo S<sup>ro</sup> Abato Honincks, paroĥestro en La Plante, propagandis Esperanton antaŭ granda ĉeestantaro en Salzinnes apud Namuro.

Tuj post la brila kaj sukcesplena parolado de nia simpatia kunlaboranto oni starigis en Salzinnes esperantistan grupon kiu, kune kun la «*Namura Stelo*» fervore klopodos por triumfigi la genian kreitaĵon de Doktoro Zamenhof.

OSCAR VAN SCHOOR.

## Het Esperanto in den Vreemde L'Esperanto à l'Etranger

**Spanje.** — (V<sup>e</sup> Congrès van Esperanto (5-12 Sept.) Het feest, jaarlijks door de «*Revue*» tijdens de congressen ingericht, zal ditmaal volgens Spaansche wijze den naam dragen van «*Bloemenspelen*» (Floraj Ludoj). Kostelijke prijzen over allerlei letterkundige onderwerpen worden uitgelooft o.a. door het Comité van het Congres, het bestuur van «*la Revue*», Z, Ex. den heer **Johano de la Cierva**, Minister van Binnenlandsche zaken, Mgr **Bennloch**, Bisschop van Barcelona, den heer **Baron de Bonet**, rector der Universiteit en het stedelijk bestuur van Vilasar. De prijs van **Belga Esperantisto** bestaat in een gesmeden rozentak, vervaardigd door den Antwerpschen kunstsmid Hansen; het gekozen onderwerp is eene plaatselijke legende van 5 bladzijden. In ons a. s. nummer zullen wij het volledig programma der «*Floraj Ludoj*» mededeelen. De handschriften worden vóór 1 Juni ingewacht op het bureel van «*la Revue*», 79, Boulevard St Germain, Parijs.

— Naar het voorbeeld der congressen van Cambridgeen Dresden worden te Barcelona lessen van Esperanto gegeven aan eene groep politieagenten.

— Na het congres zullen door de stad Valencia drijdaagsche feesten ingericht worden.

**ESPAGNE.** (V<sup>e</sup> Congrès d'Esperanto (5-12 Sept.) La fête, que «*la Revue*» organise annuellement à l'occasion des congrès, s'appellera cette fois-ci d'après la mode espagnole, «*jeux floraux*» (Floraj Ludoj). Des prix de valeur pour toutes sortes de sujets littéraires sont alloués, entre autres par le Comité du Congrès, la direction de «*la Revue*», S, Exc. M. **Johano de la Cierva**, Ministre de l'Intérieur, Mgr **Bennloch** évêque de Barcelone, M. le **Baron de Bonet**, Recteur de l'Université et la municipalité de Vilasar. Le prix de **Belga Esperantisto** consiste en une branche de rosier en fer forgé, œuvre de l'artiste forgeron anversois Hansen; le sujet prescrit est une légende locale de 5 pages. Dans notre numéro prochain nous communiquerons le programme complet des «*Floraj Ludoj*». Les manuscrits doivent être envoyés avant le 1<sup>er</sup> juin au bureau de «*la Revue*», 79, Boulevard St Germain, Paris.

— A l'exemple des congrès de Cambridge et de Dresde il se donne à Barcelone des cours d'Esperanto à un groupe d'agents de police.

— La ville de Valence organisera des fêtes postcongressistes qui dureront trois jours.



**NEDERLAND.** Esperanto wordt onderwezen in het pensionaat St-Louis te Roermond, nevens de voornaamste moderne talen (Fransch, Duitsch en Engelsch).

**FRANKRIJK.** — Het laatste nummer der « Gazeto Oficiala » vermeldt op 5 Januari 1909 het bestaan van 303 steden met esperantische consulaten, 1242 groepen, 131 beroepsverenigingen en 78 tijdschriften. De overeenkomstige cijfers op 5 December waren 299, 1170, 126 en 76.

— Leergangen van Esperanto worden aan de soldaten gegeven in de volgende garnizoensteden: Douai, Angers, Blois, Bourges, Orléans, Tours en Hyères.

— De steden Rouen, St-Etienne en Charenton schenken hulp gelden aan hunne esperantische groepen.

— Esperanto neemt een groote ontwikkeling in Parijs. De heer Archdeacon gelukte er in een doeltreffende propagande te maken in den kring der luchtreizigers en in l'Aero, wiens hoofdsteller, de heer Farfotte, onze taal aanleert. Eene groep studenten van het Lycée Henri IV, hebben eene vereeniging gesticht, die voor doel heeft de invoering van het Esperanto bij het Middelbaar Onderwijs te bevorderen.

— Het Esperanto is in vollen vooruitgang te Abbeville, Beauvais, Blois, Bordeaux, Rouen, Douai, Cherbourg, Creusot, Marseille, Nice, Trélassé en Vienne.

— Te Rouen (41, rue de la Vicomté) houdt zich iederen avond een lid der plaatselijke groep ter beschikking van de vreemde esperantisten, die de stad bezoeken.

— Het regionaal congres der groepen der Departementen Nord, Pas-de-Calais en Somme zal dit jaar plaats hebben te Condé a/S den 11<sup>en</sup> Juni. Condé is een lief stadje dicht bij de grens: het is te hopen dat men er vele Belgische esperantisten zal ontmoeten.

**DUITSCHLAND.** — Het Hamburger vakblad « Der Handelsstand » bevat eene reeks uitmuntende propaganda artikelen over Esperanto, geschreven door onzen vriend, den heer W. A. Vogler.

**PAYS BAS.** L'Esperanto est enseigné au pensionnat S. Louis à Ruremonde au même titre que les principales langues modernes (Français, Allemand et Anglais).

**FRANCE.** — Le dernier numéro de la « Gazeto Oficiala » mentionne l'existence au 5 janvier 1909, de 303 villes où existent des consulats espérantistes, 1243 groupes, 131 unions professionnelles et 75 revues. Le 5 décembre les chiffres correspondants étaient 299, 1170, 126 et 76.

— Des cours d'Esperanto sont donnés aux soldats dans les villes de garnison Douai, Blois, Bourges, Orléans, Tours et Hyères.

— Les villes de Rouen, St-Etienne et Charenton accordent des subsides à leurs groupes espérantistes.

— L'Esperanto prend un grand développement à Paris. M. Archdeacon a réussi à faire une propagande efficace dans la société des aviateurs ainsi qu'à l'Aero, dont le rédacteur, en chef, M. Farfotte, apprend notre langue. Un groupe d'étudiants du Lycée Henri IV vient d'organiser une société qui a pour but de favoriser l'introduction de l'Esperanto dans les établissements de l'Enseignement Secondaire.

— L'Esperanto est en plein progrès à Abbeville, Beauvais, Blois, Bourdeaux, Rouen, Douai, Cherbourg, Creusot, Marseille, Nice, Trélassé et Vienne.

— A Rouen (41, rue de la Vicomté) les espérantistes étrangers à la ville trouveront chaque soir un membre du groupe local, qui se mettra volontiers à leur disposition.

— Le congrès régional des groupes des départements du Nord, du Pas-de-Palais et de la Somme aura lieu cette année-ci à Condé s/E. le 11 juin. Condé est une charmante petite ville à deux pas de la frontière; il est à espérer ou'on y rencontrera beaucoup d'espérantistes belges.

**ALLEMAGNE.** La revue professionnelle « Der Handelsstand » de Hambourg publie une série d'excellents articles de propagande espérantiste, écrits par notre ami, M. W. A. Vogler.

— Gedurende den a. s. Zomer zullen de touristen die de Rijnvallei bezoeken in Godesbergeen « Rejna Esperantujo » vinden, eene inrichting die aan de menigvuldige vreemdelingen een onschatbaren dienst zal bewijzen.

— In Berlijn worden een groot getal leergangen van Esperanto gegeven; een dezer wordt gevolgd door twee Chinezen, Dr S. G. Ling en Dr S. W. Loi, voor het Chineesch staatsbestuur naar Duitschland gestuurd om er de onderwijsmethoden te studeeren. Hunne uitspraak is zeer goed, een bewijs dat de Chineezen gemakkelijk Esperanto kunnen aanleeren.

— Het « Saksa Esperanta Instituto » te Dresden, is thans officieel door de Regeering erkend. Het telt 1322 leerlingen en 31 leergangen. — In Dresden zijn voor het oogenblik meer dan 3000 esperantisten. De groep der esperantische policieagenten telt thans 135 leden.

— Groote vooruitgang van het Esperanto wordt aangestipt te Chemnitz, Braunschweig, Bremen, Dantzig, Aken, Keulen, Hamburg, Leipzig, Straatsburg, en Stuttgart.

Het a. s. congres der Duitse esperantisten zal dit jaar plaats hebben te Gotha, van 21 tot 23 Mei.

**ENGELAND.** — (Bijzondere Briefwisseling).

Het « Heftel Institute » voor het aanleeren van vreemde talen heeft het Esperanto op zijn leerprogramma gebracht. Een leergang van Esperanto werd gesticht bij de « Vereeniging van kristene jonge lieden », die meer dan 80.000 leden telt. Eene socialistisch esperantische bond werd onlangs ingericht. In Highbury, in Sewisham en in den Londenschen club hadden onlangs zeer wel gelukte esperantische feesten plaats, eveneens in de « Muswell Hill Conservatory », waar ook Esperanto onderwezen wordt. De wereldbekende reisagentie « Th. Cook and son » heeft in haar handboek een esperantischen tekst ingelascht.

— Onze correspondent uit Ipswich meldt ons dat de hervormingsgezinde beweging in Engeland teenemaal mislukt is. De heer T. D. Stead, bestuurder van de « Review of Reviews » tee-

— L'été prochain les touristes qui visitent la pittoresque vallée du Rhin trouveront à Godesberg un « Rejna Esperantujo »; cette institution rendra des services inappréciables à de nombreux étrangers.

— A Berlin il se donne un grand nombre de cours d'Esperanto; un d'entre eux est suivi par deux Chinois, Dr S. G. Ling et Dr S. W. Loi, envoyés en Allemagne par le gouvernement chinois pour y étudier les méthodes d'enseignement. Leur prononciation est très bonne, ce qui démontre que les Chinois peuvent facilement apprendre l'Esperanto.

— Le « Saksa Esperanta Instituto » de Dresde vient d'être officiellement reconnu par le Gouvernement. Il compte 1322 élèves et 31 cours. Dresde a pour le moment plus de 3000 esperantistes. Le groupe espérantiste des agents de police comprend 135 membres.

— Un grand progrès de l'Esperanto est constaté à Chemnitz, Brunswick, Brème, Dantzig, Aix-la-Chapelle, Cologne, Hamburg, Leipzig, Strasbourg et Stuttgart.

Le prochain congrès des espérantistes allemands aura lieu à Gotha, du 21 au 23 mai.

**ANGLETERRE.** — (Correspondance particulière).

Le « Heftel Institute » pour l'enseignement des langues étrangères a mis l'Esperanto à son programme. Un cours d'Esperanto a été organisé à « l'Union chrétienne des jeunes gens », laquelle compte plus de 80.000 membres. Il a été fondé une ligue espérantiste socialiste. A Highbury, Sewisham et au club de Londres ont eu lieu dernièrement des fêtes espérantistes très réussies, de même au « Muswell Hill Conservatory » où on enseigne également l'Esperanto. L'agence de voyages universellement connue « Th. Cook and son » a inséré un texte espérantiste dans son manuel.

— Notre correspondant d'Ipswich nous écrit que les tendances réformistes ont totalement échoué en Angleterre. M. T. D. Stead, directeur de la « Review of Reviews », proteste énergiquement contre la « Délégation »,



kent een krachtig protest aan tegen de « Delegation » die van zijnen naam ten haren voordeele misbruik heeft gemaakt.

— In het Vereenigd Koninkrijk ontstonden in 1908, 47 nieuwe esperantische groepen. Het Esperanto wordt officieel in 40 scholen onderwezen. Buiten de Oxforder universiteit heeft ook het Nationaal Verbond der Onderwijzers examens ingericht.

**OOSTENRIJK.** — In Weenen bestaan 10 leergangen; de Tcheken hebben hun eigene groepen. De studenten van Gratz hebben een academische esperantische maatschappij gesticht. De handelsacademie van Krakau heeft het Esperanto in haar programma opgenomen. De anti-alkoholische vereeniging der zelfde stad benuttigt Esperanto voor het internationaal verkeer. Het vakblad « Der Kaufmann » van Teplitz neemt eene reeks zeer belangrijke artikelen over Esperanto op, geteekend door den heer Wilhelm Heller van Leitmeritz.

**ITALIË.** — Een in Esperanto opgestelde omzendbrief meldt ons dat gedurende de maanden Maart en April een belangrijke internationale tentoonstelling zal plaats hebben. Het is de eerste die officieel onze taal zal bezigen in hare betrekkingen met het Buitenland.

Een bijzondere afdeeling is voor Esperanto bestemd.

Voor allerlei inlichtingen wende men zich tot den heer A. Tellini, Casella Postale, 12 te Bologna.

**ZWITSERLAND.** — Na eene voordracht, onlangs te Neuchatel door den heer E. Privat gegeven, hebben 200 personen een verzoekschrift aan de Regering gestuurd opdat Esperanto bij de hoogere en handelsscholen des kantons worde onderwezen, zooals dit reeds bestaat in de kantons Geneve Waadtland en Freiburg.

**RUMENIE.** — De vreemdelingen die Bucharest bezoeken zullen allerle gewenschte inlichtingen vinden in de « Berăria Academiei », Bul. Academiei 4. Op een der vensters is in

qui a abusé de son nom à l'avantage du mouvement qu'elle a organisé.

— Pendant 1908 il a été fondé dans le Royaume-Uni 47 nouveaux groupes espérantistes. L'Esperanto est enseigné officiellement dans 40 écoles. De même que l'Université d'Oxford, la Ligue Nationale des Instituteurs a organisé des examens.

**AUTRICHE.** — Il existe à Vienne 10 cours d'Esperanto; les Tchèques ont des groupes séparés. Les étudiants de Gratz ont fondé une société espérantiste académique. L'académie commerciale de Cracovie a mis l'Esperanto à son programme. La société anti-alcoolique de la même ville utilise l'Esperanto pour ses relations internationales. La revue professionnelle « Der Kaufmann » de Teplitz publie une intéressante série d'articles de propagande, dus à M. Wilhelm Heller de Leitmeritz.

**ITALIE.** — Une circulaire rédigée en Esperanto nous apprend que pendant les mois de mars et d'avril une très intéressante exposition universelle aura lieu à Bologne. C'est la première qui emploiera officiellement notre langue dans ces relations avec l'Étranger.

Une division spéciale est réservée à l'Esperanto.

Pour tous renseignements s'adresser à M. A. Tellini, Casella Postale, 12, à Boulogne.

**SUISSE.** — Après une conférence donnée récemment à Neuchatel par M. E. Privat, 200 personnes ont envoyé une pétition au Gouvernement, pour que l'Esperanto soit enseigné dans les écoles supérieures et commerciales, comme cela se fait déjà dans les cantons de Genève, Vaud et Fribourg.

**ROUMANIE.** — Les étrangers qui visitent Bucharest trouveront tous les renseignements désirables à la « Berăria Academiei », Bul. Academiei 4. Sur une des vitrines on peut lire en

groote letters te lezen « Esperanto, Kunveno de Esperantistoj ». Allerlei esp. rantische tijdschriften liggen op de leestafels. Een der bedienden spreekt Esperanto; hij draagt de groene ster in zijn knopsgat.

**AZIATISCH TURKIJE.** — In Samos wordt het maandschrift « Greklingva Esperantano » uitgegeven met Griekschen en Esperantischen tekst.

Het blad vermeldt het bestaan van vier leergangen in Samos, de stichting eener groep in Smyrna en den vooruitgang van het Esperanto in Aidin, waar onze taal onderwezen wordt in de Turksche en de Joodsche scholen. De groep van Aidin telt 100 leden waarvan 20 Grieken, 50 Israëlieten 20 Turken en 10 Armeniërs.

— Een esperantische groep werd onlangs gesticht te Jeruzalem.

**ARABIE.** — De heer Gabrijelo Haddad, maronitsch geestelijke, heeft een esperantische spraakleer in het Araabsch uitgegeven.

grandes lettres « Esperanto. Kunveno de Esperantistoj » Diverses revues espérantistes y sont en lecture. Un des garçons ar lepl' Esperanto; il porte l'étoile verte à la boutonnière.


**TURQUIE D'ASIE.** — A Samos vient de paraître la revue mensuelle « Greklingva Esperantano » avec texte grec et esperanto.

Le journal mentionne l'existence de quatre cours à Samos, la fondation d'un groupe à Smyrne et les progrès de l'Esperanto à Aidin, où notre langue est enseignée dans les écoles turques et juives. Le groupe d'Aidin compte 100 membres, dont 20 Grecs, 50 Israélites, 20 Turcs et 10 Arméniens.

— Un groupe espérantiste vient d'être fondé à Jérusalem.

**ARABIE.** — M. Gabrijelo Haddad, prêtre maronite, vient de publier un cours d'Esperanto en langue arabe.

Oscar VAN SCHOOR.



## HUMORAĴOJ

### La Advokato kaj la Kamparano

Laboristo estis falinta sub la elektran tramveturilon kaj vundigis je la kruro. Li procesis kontraŭ la Societo por ricevi kompensajon kaj la juĝistaro komdamnis ĝin por pagi al la malfeliĉulo 500 frankojn.

Kelkajn tagojn poste, tiu ĉi iris al sia advokato por ricevi la monon kaj tre miris, ricevante nur cent frankojn. Longtempe kaj sen paroli li regardis la bluan bileton.

— Kio estas? demandis al li la advokato. Pri kio vi pensas?

— Mi pripensas, respondis la laboristo, ĉu estas mi aŭ vi kiu falis sub la tramveturilon!

— 0 —

### Spiritista dialogo

— Ho! spirito de mia edzo, ĉu vi estas tie ĉi ĉeestanta?

— Jes, respondas mallaita voĉo,



- Diru do al mi, mi vin petas, ĉu vi estas feliĉa ?
- Multe, multege.
- Multe pli ol kiam ni kunvivis ?
- Jes, edzino, jes.
- Kaj kie vi estas nun ?
- En la kvina infero !!! (Monde esperantiste)

— 0 —

### Malkompreno

Profesoro : Sinjor' kandidato, viaj respondoj ne estas malbonaj, sed iom ŝanceliĝantaj.

Studento : Mian honorvorton ! Sinjor' profesoro, mi ankoraŭ trinkis nenion hodiaŭ. (Spritulo)

### PROBLEMOJ (tre facilaj)

1<sup>o</sup> Al la vortoj :

— ombro — bono — lado — aso — duko — ringo — rado  
— eliro — tero — akso — fiŝo ]  
aldonu unu antaŭantan literon por fari novajn vortojn signifantajn :

— Kvanto — valora materio — el la teleraro — idaro — instruado — birdo — marŝado — sekvo de febro — aero — malsaneto — sciiganta papero.

La aldomtaj literoj, akrostike legitaj, formos frazon, kiu devas esti la devizo de ĉiu Esperantisto.

2. **Metagramo simpla.** (Ŝanĝu nur la unuan literon).

Loĝejo — Vi kaj mi — Signo de interpunkcio — Tio kion ni ricevis de niaj gepatroj — Frukto — Urbo — Perforta eljeto.

3. **Anagramo.** La literoj *a, o, o, k, n, r, t*, trifoje miksitaj formas la tri nomojn signifantajn : kantisto — historiaĵo — imperiestro.

PLANTANO

### Diversaj informoj

La abonantoj, kies abonprezo ĝis nun ne jam estas pagita, estas petataj ĝin sendi senprokraste al S<sup>ro</sup> Osc. Van Schoor, 20, Vondelstraat, Antwerpen (20, rue Vondel, Anvers).

Je l'komenco de la venonta monato la ne pagitaj abonoj estos enkasigataj per poŝta kvitanco.

— Deziras korespondi :

F<sup>ino</sup> Müller-Lousky, Holbeinstr. 53, Dresden.

F<sup>ino</sup> Berte Kühnel, Ferdinandstr. 9<sup>o</sup> Dresden.

— S<sup>ro</sup> TH. CART petas de ni la enpreson de la jena noto :

« Ni staras sur firma fundamento : lingvo Zamenhofs, plena kaj viva ĝin ni konservas ne ŝanceliĝante. Tio tamen ne signifas, ke, kiel ĉiu lingvo viva, ĝi ne kreskos kaj evolucios, sed nature, tial ke eĉ ĉe artefarita lingvo la *evolucio devas esti natura*. Por konstati tiun evolucion, por ordigi, *reguligi* ĝin, por teni akordon inter diverslingvanoj ni bezonas pli malpli frue sed neĉube *internacian akademion aŭ komitaton*, kies rolo estos ne korekti la lingvon internacian laŭ « aprioriaj » principoj, sed montri laŭ scienca filologia metodo la plej komunan internacian uzon, la novajn generale akceptitajn vortojn kaj konservi, *sub internacia aŭtoritato kaj kontrolo*, la necesan unuecon, la necesan harmonion. Tia komitato estos efektive nur *regulatoro*, sed tio sufiĉas. Malgraŭ kelka kontraŭstaro ĉiuj akceptos tiun solvon, ĉar ju pli granda la disvastigo de Esperanto, des pli necesa tia ilo aperos al ĉiu. » (el Rondiranto, Febr. 1904).

TH. CART

Ĉefredaktoro de « Lingvo Internacia »

P.S. — Tion mi skribis antaŭ pli ol 4 jaroj. La saman opinion ĉiam defendis « Lingvo Internacia ». Ĝi do ne atendis la nunajn polemikojn por paroli kontraŭ *aprioriaj reformoj*, pri *natura evolucio* kaj por *regulatoro* de nia lingvo.

— « Ĉasopis Českých Esperantistu », ĉefredaktoro E. KÜHNEL, enhavos de Januaro 1909 literaturan 4paĝan aldonon (Legolibro de bohemiaj Esperantistoj).

— Oni anoncas le baldaŭan aperon de esperantista ĵurnalo en Aĥeno (Aken, Aix-la-Chapelle), kiu ĉefe celos starigi ligilon inter la okcidentaj, belgaj kaj holandaj grupoj.

La gazeto aperos provizore duonmonate ; ĝia abonprezo estas m 1. — = 1Sm.

Ĉiujn korespondadojn por la nova organo oni sendu al S<sup>ro</sup> SCHMITZ, 2<sup>a</sup> sekretario de la Aĥena Grupo, subdelegito de l' U. E. A.

— Dum la nuna monato reaperos « Espero Katolika » Redakcio kaj Administracio S<sup>ro</sup> Claudius Colas, 23, rue Denfert-Rochereau, Paris.

## LITERATURA PARTO

### ARDENLANDO

*El la bela verko « La Forge Roussel » (la Rusel' a forĝejo) de EDMOND PICARD.*

EDMOND PICARD naskiĝis en Bruselo, la 15<sup>an</sup> de Decembro 1835. Apenaŭ dekokjara li enŝipiĝas sur belga ŝipo, vojaĝas ĉirkaŭ la mondo, reventuras kiel maristo al sia hejma lando, akiras, post brila ekzameno, la ofiran diplomon, fine, elektinte alian vojon, iras al l'universitato de Bruselo, kie, en 1860, li ricevas, kun plej granda sukceso, la diplomon de doktoro



de leĝoscienco. Tiam febroplena agemeco incitas lin al plej diversaj okupadoj, kaj ĉie li brilas je l'unua rango dank' al la supereco de sia talento, al l'originaleco de sia spirito. Advokato, li ludas rimarkindan rolon en plej famaj procesoj; — leĝosciencisto, li publikigas verkojn, kiuj havas aŭtoritaton kaj konstruas l'ampleksan enciklopedion de la belga leĝoscienco, nome la belgaj pandektoj; — politikisto, li multobligas sian aktivecon per paroladoj, broŝuroj, journaloj kaj riprezentas la socialistan partion ĉe la belga senato, kie li brile partoprenas en ĉiuj gravaj diskutadoj; — kritikisto, artisto, verkisto, li estas unu el la plej ŝatataj literaturistoj de nia epoko.

\* \* \*

Mi amas Ardenlandon! De dudek jaroj mi tien iras ĉiuŝtate, konfuza rasa instinkto, artista antaŭenpuŝado aŭ turista memoro... mi amas Ardenlandon!

Certe Belgujo enhavas belajn pejzaĝojn, kaj se iu, foririnte el La Panne ĉe la marbordo, piedirus tra mia patrujo ĝis « La Baraque Michel » (La Mihela Domaĉo) en la altaj marĉegoj apud la prusa landlimo, granda kaj ĉarma estus la diverseco por liaj okuloj kaj por lia koro. Mi ne aludas la urbojn kaj iliajn mirindaĵojn. Ni forgesu ilin por pripensi nur naturon kiun la fremdulo neniam atentis en landoj kiel la nia, kaj kiu restas l'intima sanktejo, kie nur landidoj eniras; kiun nur ili konas, amas, admiras.

Estas ankaŭ eble ke nur por ili tiuj pejzaĝoj aŭdigas sian muton lingvajon kaj elmontras siajn karajn kortuŝigantaĵojn.

Kiam, turnante la dorson al la unuforma linio de Flandro, oni rigardas la ŝanĝantajn ondojn de la Nordmaro, preskaŭ ĉiam movemajn, preskaŭ ĉiam nebulegajn alikoloriĝantajn laŭ la kapricoj de la turmentita ĉielo, kiu ilin superkovras, oni sentas ĉu kvietecon kaj ĝojon eniĝi en sin mem, ĉu revadon profundan kaj severmoran, kiu ŝajnas pli bone rilati kun la vivodramo.

Kiam, forlasante tiun vidaĵon, kiu altenpuŝas lulante, oni turniĝas al la internaĵo kaj eniras en la ŝablajn montetojn, kiuj borderas la landon laŭmare, tiam la koro trankviliĝas sed restas tamen tuŝata antaŭ la horizonto malpli vasta de la sablaj ondolinioj, kiuj sin sekvas unu la alian, jen kovritaj per rigidaj kaj tremantaj herboj, jen nudaj, koloritaj laŭ pala kaj arĝenta flaveco, havigantaj al kiu antaŭeniras en iliaj faldoj, saman impreson kiel dezerto.

Kaj kiam, suprenirante sur iliaj lastaj supraĵoj, oni subite ekvidas la flandran kamparon, platan kaj nedifinitan, malaperantan malproksime, tre malproksime en dubeviola nebulo, kun ĝiaj paŝtejoj en la antaŭa parto, kun ĝiaj arborrangoj kelkafoje tiel multnombraj ke ili iluzie aperas kiel arbaro, montranta skalon de verdaĵo per tonoj tiom akutaj ke ŝajnas ke pluvo ĵus heliĝis ilin lave; kiam la ruĝaj tegmentoj sur kampaj domoj pikas tiun belegan tapiŝon kaj ĝin ornamas

same kiel bantoj sur robo, kiam la preĝejoj turoj en vilaĝoj elstaras samaj kiel lumturoj en tiu senlima spaco, oni demandas al si kio estas pli potenca por tuŝi nian animon. Ĉu tiu ĉi verdajoceano kvieto kaj ripo-anta, ĉu tiu oceano ĉiam movema, kies sonĝon oni aŭdas malantaŭe.

La Skeldo en tiu parto, kie la marmovado estas ankoraŭ sentebla kaj kie la marŝipoj kavigas ĝiajn ondojn, allogas, ne per la diverseco de la vidaĵoj, sed per la grandeco de siaj malaltaj, herboriĉaj bordoj, kiuj lasas vidi de arboj nur supron, de domoj nur tegmentojn. Ĉi tie ankaŭ, ĉio formas, en kuniĝo, melankolian harmonion. La palgriza akva rubando longiĝas kiel serpento sur l'unuforma kaj verda supraĵo de la polderoj. Brutoj blankaj, nigremakulitaj punktigantaj la herbejon kiel la marŝipoj punktigas la riveron, ŝajnas mem pensemitaj de la kvieto unuformeco de tiu vidaĵo.

Se poste oni antaŭeniras en la lando, oni baldaŭ alvenas al regiono de densaj vilaĝoj, kie la flandra puremeco heligas la pejzaĝon per la lakta blankeco de la loĝejoj. El ĉiu loĝejo, same kiel el centro de ia grandega rado disradias plataj kamparvojoj. Ili rubande malvolviĝas tra fruktodonaĵ kulturajoj borduritaj de alnoj, montrantaj tie ĉi kaj tie dikan kaj malpalan teron. Ĉie aperas, meze de foliaro, malaltaj domoj, kiuj ŝajnas dissemataj de la centra domaro. L'animo ripoziĝas en profunda sentaĵo de kvieto kaj memfida sufiĉegeco.

Se iu serĉas en naturo impreson ankoraŭ pli penetrantan de poezia paco, en Kempenlandon li devas iri, kie l'ebenaja zono ekaliformiĝas en sablaj dezertoj, sur kiuj abiaj plantajoj desegnas malhelajn makulegojn. Eriko etendiĝas je grupoj rozkoloraj kaj odoraj kie marĉajo tie ĉi kaj tie dormadas. Vojoj, je l'trafo konstruitaj en senfrukta tero, malvolvas malproksimen siajn nedifinitajn malrektaĵojn. Domoj estas maloftaj kaj malriĉaj. Izoleco pezas sur la silenta pejzaĝo.

La flandra ebenajo malaperas, jen Brabandalando. La tero ekmontiĝas kvazaŭ interna forto ĝin ŝveligus. La unuaj montetoj malpligrandigas la horizonton. Sur ilia flanko estas konstruitaj la unuaj kavaj vojoj kun ombraĝoriĉaj bordkrutaĵoj kaj profundaj radkavoĵoj. La suproj kovriĝas per arbaroj kie dense kreskas altaj fagoj.

Sed kiam oni antaŭeniras tra la ondoliniaĵoj, kiuj longiĝas, la granda kulturado aperas kun siaj senarbaraj supraĵegoj. La pejzaĝo paliĝas kaj ĝia nudeco malfortiĝas ĉiun sentaĵon. Enuo ekaperas subite; la plataĵo malaltiĝas, faldoj tie formiĝas, kavigas valaforme; la ŝtonego trapikas la deklivojn; akvo-fluetoj defluas; herbejoj borderas ilin; la ombraĝoj reaperas kaj akompanadas la riveretojn, kiuj ĉiam pligrandiĝante ŝveliĝas kaj fariĝas riveroj rapidaj kaj bruaj. Tio estas la mal-



suprenirado al la Meuse (Mas'o), al la Namur'a kaj Liegà lando.

Kiom bela estas tiu profunda valo, kie la rivero, inter la belegaj muroj de siaj dubebblankaj ŝtonegoj, ru'as ondojn, kiuj malklariĝas nur post pluvegoj! L'animo ne plu ŝatas songadi antaŭ tiu pentrinta kaj viva pejzaĝo; vigla, ĝi altiĝas al la heroaj sentaĵoj.

Se, forlasinte tiujn bordojn, kiujn oni ne povas vidi sen deziri, almenaŭ dum unu horo, tie pasigi sian vivadon, oni supreniras sur l'alia deklivo per unu el la vojoj trairantaj kamparon kie tero fariĝas pli kaj pli seka kaj ŝtronriĉa, oni baldaŭ miras kiom ampleksa fariĝas la horizonto. Ĝi etaĝe aperas laŭ nedifinitaj linioj de amfiteatre kunmetitaj montoj, kiuj pro malproksimeco fariĝas pli kaj pli nebulaj. La pejzaĝo en sia tuteco havas ŝajnon severan kaj malgajan de dezerta kaj malriĉa regiono; sed ĝi estas granda en sia muta kaj tragedia malgajeco. Ĝi estas Ardenlando, kaj viva koro neniam rigardadis ĝin, je la unua fojo, sen sentiĝi tuŝita.

Jes, mi amas ĝin, kaj de dukek jaroj mi iras tien ĉiuaŭtune! Ondo, ebenaĵo, eriko, monteto, ŝtonego, el ĉio, kion prezentas al l'okulo mia naskiĝa lando, ĝin mi preferas, ĝi naskas plej profunde en mi mem tiujn sentaĵojn revajn kaj pasiajn, kiuj estas la alta vivo de nia epoko. En aŭtuno, kiam la foliaro rustekoloriĝas dum la noktoj plimalvarmiĝintaj, jen kiam tiu korpremanta kaj dolĉa impresio ekkaptas min per sia tuta morda forto. Ĝi estas la sezono de l'ardena lando, same kiel la somero estas tiu de l'marbordo, kiel la printempo tiu de l'kempena, de l'brabanda kaj de l'flandra lando.

(Kun la permeso de l'aŭtoro, esperantigita de  
O. CHALON (Bruselo).)

## BIBLIOGRAFIO

« Belga Esperantisto » nur recenzas la verkojn senditajn al ĝi en du ekzempleroj. (Adreso: Arendstraat, 24, Antwerpen.)

I. **Presa Esperantista Societo**, rue Lacépède, Paris.  
*Pourquoi l'Esperanto?* Lettres à un ami, 24 pages (12×29).  
Prix fr. 0,25 = 1 sd.

II. **Tip. de la « Gaceta de Guadalajara »**, Guadalajara (Mejico).

*Rudimentos de Esperanto* por ALBERTO GOMEZ, CRUZ, jr. (12×19) 82 paĝoj, libro en hispana lingvo redaktita.

Prezo 75 sd.

III. **Pubul y Morales**, Avellanas 7, Valencia.

*La Perfekta Edzino*, de Fray Luis de León, el la Hispana lingvo tradukis AUGUSTO JIMÉNEZ LOVIA, (12×19) 129 paĝoj.

Prezo: 2 Pesetoj = 80 sd.

IV. **Esperanto Verlag Möller & Borel**, Berlin.

1. *Esperantista Poŝkalendaro* por 1909. (11×16) 125 paĝoj.

Tio estas koketa per verda tolo bindita libreto, kiun ĉiu Esperantisto devas posedi.

Jen ĝia enhavo: Klarigoj por la dataro. — Dataro. — La Espero, himno esperantista (kun la notoj). — Esperanta alfabeto laŭ Braille. — Projektoj de lingvoj internaciaj (1629-1907). — Deklaracio pri Esperanto, oficiala teksto de la Boulogne'a kongreso. — Barcelono. — Internacia mona tabelo. — Esperanta Stenografio. — Dimanĉo datoj. — Esperantista Gazetaro. — Universala Esperanto-Asocio. — Listo de esperantistaj konsulejoj, oficejoj de la Universala Esperanto-Asocio, esperantistaj Grupoj, societoj kiuj korespondas Esperante, esperantistaj hoteloj, restoracioj k.c. — (tre interesa!) kaj Anoncoj.

La « Esperantista Poŝkalendaro » havas grandan praktikan utilecon kaj estas samtempe bonega propagandilo.

Prezo fr. 1.— (40 sd.)

2. *Unua Legolibro* de D<sup>ro</sup> KABE, 2<sup>a</sup> eldono, (12×17). 185 paĝoj.

Prezo Mk. 1.50 = Sm. 0,75

Tiu ĉi libro estas ne nur utila sed eĉ necesa al la novaj esperantistoj, kiuj trovas en ĝi agrablajn kaj gradigitajn legaĵojn. Ĝi enhavas plie tre praktikan frazlibron kaj modelojn de literoj.

Persona sperto permesas al mi altsati ĝin kaj igas min ĝin varme rekomendi, tiel pro la bona elekto de la teksto kiel pro la pureco de la lingvo kaj de la stilo.

3. *Elektitaj fabeloj de l'fratoj Grimm*, tradukis el la germana lingvo D<sup>ro</sup> KABE. (12×17) 200 paĝoj.

Prezo Mk. 1.50 = Sm. 0,75.

La « Kinder-und Hausmärchen » (Infanaj kaj hejmaj fabeloj), publikigitaj de Jacob Grimm en kunlaborado kun lia frato Wilhelm Grimm, travivis en Germanujo multnombrajn eldonojn kaj tie estas universale konataj kaj ŝatataj.

Mi ĉerpas el la antaŭparolo:

» La rakontoj de fratoj Grimm, kiel ĝenerale ĉiuj fabeloj, » plej multe plaĉas al infanaj legantoj; ĉi tiu fakto estas facile » klarigebla: dank' al ilia naiva kredo kaj impresiĝemo la » infanoj ne sole legas la rakontojn, sed vivas kun la herooj » de la fabeloj.

» Sed ne sole la infanoj legas kun plezuro la Grimm'ajn » fabelojn, ankaŭ la maturaj homoj ŝatas ilin: unuj kiel simpl- » an, facilan legaĵon, kiu agrable ripozigas la cerbon, aliaj



» kiel materialon por folkloraj studoj, fine maljunuloj — po.  
» vekoj la rememorojn kaj per la penso ree travivi la autar  
» longe pasintan infanecon. »

Leginte diversfoje la germanan eldonon de la Grimm' aj fabeloj, mi plene pravigas la suprajn konsideradojn.

S<sup>ro</sup> Kabe havis bonegan ideon, publikigante esperantan tradukon de tiu bela libro. Li plenumis tiun taskon bonege kaj pliriĉigis la esperantan literaturon per verko, kiu meritas honoran lokon sur la legotablo de ĉiu esperantisto.

4. *Tri unuaktaj Komedioj* de A. von Kotzebue, T. Williams kaj M. Hankel. (12×17), 96 paĝoj.

Prezo Mk. 0,75 = 36 sd.

Tiuj komedioj estis ludataj dum la 4<sup>a</sup> Internacia Esperantista kongreso en Dreseno (Aŭgusto 1908) kaj tie ricevis tre grandan sukceson.

Estis por mi granda plezuro relegi tiujn teatraĵojn kaj ree ŝati ilin je tiu okazo.

La libro estas tre rekomendinda.

Kiel ĉiuj eldonoj de la firmo Möller & Borel la kvar supre pritraktitaj libroj distingigas per bele zorgita presado kaj bona papero.

V. **Esperanto House, LEEDS.**

*Trezoro de l'Ŝorcistoj*, ĉefredaktoro FERNAND MARÉCHAL. Jaro 1, N<sup>o</sup> 1.— (12×18), 64 paĝoj.

Prezo 1 ŝilingo = 1/2 Sm.

Enhavo: 1. Legendo pri la unua violono. — 2. Unuakta komedio originala: « La ensorcigita Ringo ». — 3. Vilhelmo Tell. — 4. Unuakta komedio originala « Ĉu Pumpilurbo havu (?) Pumpilon? »

Grandampleksan kaj multekostan libron oni povas kompari kun grandega ŝipo kiu nur povas elŝipigi siajn komercaĵojn en granda haveno. Malgrandaj libroj similas al delikataj ŝipetoj kiuj povas penetri en la plej mallargajn golfetojn por provizi ĉiujn partojn de la lando. Tiu estis sendube ankaŭ la opinio de S<sup>ro</sup> Maréchal kaj de liaj kunlaborantoj, kiam ili publikigis la ĉi supre cititajn literaturaĵojn. Ilia celo estas tre laŭdinda kaj ilia libro estas rekomendinda; bedaŭrinde ĝi enhavas kelkajn lingvajn erarojn, kiujn ili espereble signalos en la 2<sup>a</sup> numero de la kolekto.

AMATUS.

## NEKROLOGIO

La 6<sup>an</sup> de la nuna monato, la ANTYVERPENa GRUPO ESPERANTISTA perdis sian Nestor <sup>on</sup>S<sup>ro</sup> FR. VAN MAEL, naskiĝinta en Antverpeno, la 15<sup>an</sup> de Majo 1831.

Malgraŭ sia granda aĝo, S<sup>ro</sup> Van Mael farigis en mallonga tempo tre lerta Esperantisto. Inter siaj kungrupinoj li akiris multajn amikojn, kiuj alte ŝatis la afablecon kaj la ĉiaman bonhumorecon de la respektinda maljunulo.